# *Díaz-Canel akceptis politikan gvidanton de ?inio*



**Foto: PL**

Havano, okt 23 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo kaj prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel renkontis ?i-mardon kun Li Shulei, membro de la Politika Buroo, de la Sekretariejo de la Centra Komitato, kaj estro de la Propaganda Departemento de la Komunista Partio de ?inio (KP?).

La ?tatestro emfazis, ke la vizito de la ?ina gvidanto, tiutempe, kiun Kubo spertas, montras la nedetrueblajn ligojn de amikeco inter amba? Partioj, Registaro kaj popoloj.

"Mi sendis korinklinan saluton al nia amiko, prezidento Xi Jinping, kiun mi esperis renkonti en la Pintkunveno de Brics", skribis la prezidento en sia profilo pri X.

Díaz-Canel anka? emfazis la gravecon de la rolo, kiun ?inio ludas en la BRICS kaj ?ia rilato kun la landoj de la Sudo.

?i-marde, Li Shulei intervidi?is anka? kun la sekretario pri Organizo de la Komunista Partio de Kubo (PCC), Roberto Morales Ojeda, kiu aludis al la bonega stato de la rilatoj inter la du politikaj organiza?oj.

Dum la kunveno oni eksciis, ke balda? okazos la VI Teoria Seminario inter la koncernaj komunistaj partioj, kies centra temo estas "Akcelu la aferon de la konstruado de socialismo kaj konstrui la komunumon de la komuna estonteco", spaco de granda graveco por la progresado pri temoj de komuna intereso.

Fonto: PL

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/367997-diaz-canel-akceptis-politikan-gvidanton-de-cinio

Radio Habana Cuba